

marzo

aprilo

1978



(2)

hejs  
hejs  
hejs  
hejs  
hejs





# ENHAVO

SCIINDAĴOJ .....	3
KIAM LA RUĜHAŬTULOJ ESTIS FORIGATAJ DE SIAJ HERBOEBENAĴOJ .....	4
KIO ESTAS "BERUFSVERBOT"?	6
HOMAJ RAJTOJ, TEORIO KAJ REALECO (22a INTERNACIA SEMINARIO DE GEJ) .....	8
LA LABORISTAJ ESPERANTISTOJ POR PLI BA- TALEMA SINTENO .....	10
LA ĈASO .....	11

---

HEJS - Marto-Aprilo 1978

N-ro 111 (2) - 20a Jaro

INTERNA BULTENO ORGANO DE HEJS

(HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO)

Junulara Sekcio de HEF - Landa Sekcio de TEJO

Sidejo: Papa Pius XI, 130 - Tel. (93) 7163633

Poŝta adreso: Apartat 407

SABADELL (Barcelona) - Hispanio

Konto n-ro 15049-56 en Banc de Sabadell

Prezidanto: Ludoviko de Yzaguirre i Maura

Ĉefredaktoro: Ōscar Puig i Cánovas

Presita en "Gràfiques El Pot" Sabadell

Dip. Legal B.6519-1977 (Leĝa registro)

PRI LA SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ, RESPONDECAS NUR  
LA AŬTORO. PRI ĈIO ALIA, RESPONDECAS LA ESTRARO  
KAJ REDAKCIO DE HEJS.

Kopirajto ©HEJS 1978

Ĉi-bultena aperdato: Septembro 1978

## ĈI 12-PAĜA BULTENO

La bulteno kiun vi havas en viaj manoj nur estas 12-paĝa anstataŭ, kiel kutime, 20-paĝa. La kialo estas simpla, ni planis enŝovi en ĉi tiu numero la poŝkantaron aperintan en nia tricbla verda numero, sed ĉar ni konstatis la neeblecon eldoni ĉi-numeron antaŭ la someraj fes totaĝoj, ni konsideris oportunan translokiĝi la kantareton al la numero aperinta antaŭ la somerfestoj kaj tiel ebligi ĝian uzadon kaj kantadon dum kongresoj kaj vojaĝoj. Vencontaj numeroj havos, evidente, 20 paĝojn.

## NI HAVAS NOVAN SIDEJON

Nia Societo havis ĝis nun luitan etan ejon en kulturala domo, sed ĉar lasttempe la luprezo grimpe plialtiĝis ni estis devigataj forlasi ĝin. Nun ni troviĝas ĉe la propra ejo de Centro de Esperanto Sabadell. En onta bulteno ni raportos pri ĝi.

## KORESPONDEMULOJ

... 13-jaraĝa knabo kiu interesiĝas pri ekologio kaj zoologio dezirus korespondi kun jugoslavia aŭ nederlanda samaĝulo/ino. Li estas Juvenal Puig i Cánovas - Güell i Ferrer, 223 - SABADELL.

... Du junaj gefratoj Mario kaj Petr. Bálek emes interkorespondi. Ilia adreso: Slitary 74 - KOLIN-VI-28000 - ĈEĤOSLOVAKIO.

... 28-jaraĝa agrokultura inĝenierino vcllas interŝanĝi bildpoŝtkartojn kaj scii pri la vivo de nia lando. Ŝi nomiĝas Kolomičnā Věra kaj loĝas en Staré Město 15 - 43801 FRÝDEK-MÍSTEK - ĈEĤOSLOVAKIO.

## KOREKTO

En HEJS triobla kaj verda, sur paĝo 26a, en 2a paragrafo kaj ĉe ĝia tria alineo, apartenanta al la artikolo de Héctor Puig "Amuze kongresi aŭ kongrese amuzi", mensoge estas skribita ke la organizintoj de la konkurso pri aĉaj verkoj estis LA KANCEPKLINIKO. La veraj kaj unikaj organizintoj de tiu aĉaĵo estis TESPА. Pri aliaj eraroj la redakcio ne emas komenti.

## 38A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN LEÓN

Laŭ ĵus-ricevita letero de la nova estraro de HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO (strato Dos de Mayo, 4 - VALLADOLID) la 38a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en León ekde la 12a ĝia la 15a de oktobro. En venonta bulteno ni informos pli detale pri tiu evento.

## 20A KATALUNA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

La 30a de septembro kaj la 1a de oktobro okazos en Tortosa (Baix Ebre) la 20a Kataluna Esperantista Renkontiĝo. Ĝia programo enhavas, inter aliaj, ekzpozicion pri la monda lingvo-problemo, aranĝita de HEJS-anoj, prelegon katalunlingvan fare de Johano Moretó i Reventós (HEJS-aktivulo kaj komitatano B de TEJO), fondaŭ asambleon de Kataluna Laborista Esperanto-Asocio (SAT), inaŭguron de strato "Esperanto" kaj, kiel ĉefaranĝo, okazigon de la 18aj Internaciaj Floraj Ludoj en Esperanto. Vere partopreninda renkontiĝo kiu meritas vian ĉeeston.

# kiam la ruĝhaŭtuloj estis forigataj de siaj herboebenajoj

LA UNUA EKOLOGIA MANIFESTO Esperantigita de ope

"Sanon, imperiistoj, la mortontoj vin salutas". La ĉi-reproduktitaj eltiraĵoj apartenas al la parolado farita en Vaŝington de seattle, ŝefo de la tribo Duwani en 1885. Devis pasi multaj jaroj ĝis kiam la vortoj de la ruĝhaŭtuloj estis aŭskultataj de la blankuloj. Liaj vortoj estas jenaj. Nun restas al ni malmulta tempo.

"La granda korporacio de Vaŝington ĵus parolis, ĝi volas aĉeti nian teron. La granda korporacio ankaŭ prononcis vortojn pri paco kaj amikeco. Tio estas bona, ĝiaflanke, ĉar ni scias ke ĝi ne bezonas nian amikecon. Sed ni konsideros ĝian oferton, ĉar ni scias ke se ni ne vendas nian teron, la blanka homo venos kun siaj fusiloj kaj eksposedos ĝin".

"Kiel vi povas aĉeti, aŭ ni vendi la aeron aŭ la varmon de nia suno? Ni ne scias nin interkompreni. Ni ne posedas la vibrantan aeron nek la akvon kiu pluvas. Kiel, tiam, vi povas ilin aĉeti?"

Nia tero estas nia sango

"Por ni tiu ĉi tero estas sanktega. Ni tre ĝuas en niaj arbaroj. Nia vivo estas malsama al tiu via. La scintilanta akvo kiu glitas laŭ la rojoj kaj riveroj ne nur estas akvo por ni, sed ĝi estas la sango mem de niaj antaŭuloj. Se ni vendas al vi la teron, vi devas bone memori ke por ni estas sanktega tero (...) Ĉiu rebrilo de la pura akvo de la lago rakontas la okazintaĵojn de la estinto de nia popolo. La lirio de la akvo estas la voĉo mem de la patro de nia patro. La riverbordo estas niaj fratoj kiuj mildigas nian soifon. La riveroj tenas kaj transportas niajn kanuojn kaj nutras niajn gefilojn".

"...Ni jam scias ke la palaj homoj ne komprenas nian vivmanieron. Por ili peco de tero estas tute egala al alia, ĉar li estas eksterlandano kiu venas nokte kaj prenas la terpecon piej plaĉa al li. La tero ne estas sia frato sed sed sia malamiko (...) Li forgesas la tombon de siaj antaŭuloj kaj la heredaĵon de siaj filoj. Li konsideras sian fraton teron kaj sian fraton aeron kiel du varoj ekspluateblaj kaj revendeblaj kiel iuj ajn aĵoj. Lia voremo devigas lin vori ĉion kio ekzistas sur la surfaco de la tero kaj post li nur restos dezerto".

"...La vivo de viaj urboj vundas la okulojn de la ruĝhaŭtuloj. Eble tio okazas ĉar la ruĝhaŭtuloj nur estas sovaĝuloj kiuj komprenas nenion. En la urbo de la blanka homo ne ekzistas rifuĝon kie ripozi. Neniu lokon ekzistas kie la homo, dum printempo, povu senti kiel malfermiĝas la floroj kaj la flugadon de la birdoj. Tiu tumulto de viaj urboj vundas niajn orelojn. Kaj, kiu senco restas al vivo de homo, kiam li jam ne povas aŭdi la ulalon de la strigo en la nokto, la kvakon de la ranoj en la kanaro ĉe la sunsubiro? Mi estas nenio pli ol ruĝhaŭtulo, mi estas besto. Indiano estimas la dolĉan lirion de la vento sur la lago kaj amas la parfumon de la aero, purigita de la pluvo de la tagnezo, kiu alportas al si la odoron de la abioj".

"La aero estas belega por la homo de ruĝa haŭto, ĉar ĉio apartenas al la aero mem. La blanka homo ne priatentas la aeron kiun li spiras. Kiam homo, de antaŭ multa tempo mortas, ne reagas se li spiras malsanan aeron".

"... Ni penas kompreni kial la blanka homo volas aĉeti nian teron, kion, ĉo, volas aĉeti la blanka homo?, al mi demandas nia popolo. Estas tion malfacile kompreni por ni! Kiel ni povas aĉeti aŭ vendi la aeron, la teron aŭ la rapidecon de la antilopo? Kiel ni povas vendi tion kaj kiel vi povas ilin aĉeti? Ĉu vi rajtas fari kion ajn vi dezirus kun la tero, tutsimple ĉar la ruĝa homo signis sur paperpeco kaj ĝin donis al la blanka homo?"

"Ni akceptos vian oferton foriri al la rezervejoj kiun vi destinis por nia popolo, por konsidero, kaj tie ni povos vivi en paco kaj soleco. Ne multe gravas la rifuĝon kie ni loĝos dum niaj lastaj tagoj. Niaj filoj vidis sian patron

rulfaligitan pro la malvenko. Niaj militistoj ekkonis la honton de la malvenko kaj iliaj tagoj fariĝis vakuaĵ, tiom ke ili venenigas siajn korpojn per sukeritaj manĝaĵoj kaj fortaj trinkaĵoj. Tute ne gravas la riĉaĵoj kie ni loĝas dum niaj lastaj tagoj. Ni ne estos multaj. Post nemultaj vintroj restos eĉ ne unu filo de niaj grandaj triboj kiuj vivis en ĉi tiuj grupoj en tiu tero, ene de tiuj arbaroj, kaj restos neniu por plori sur la tomboj de nia popolo kiu estis tiom pova kiel la via".

"Kaj, kial oni devus plori la malaperon de nia popolo? La triboj estas aroj da homoj, kaj nenio pli. La blankaj homoj ankaŭ estos senigataj, kaj eble eĉ pli rapide ol niaj rasoj."

"... Kiam la lasta ruĝhaŭtulo malaperos de tiu tero, kiam lia ombro nur estos memoro, kiel tiu de nubo pasanta sur la herboebenaĵo, tiam, ankoraŭ tiuj riverbordoj kaj tiuj arbaroj estos loĝataj de la spirito de mia popolo. Ĉar ni amas tiun landon kiel amas bebo la batojn de la koro de ĝia patrino".

"Se ni decidus akcepti vian oferton, ni metas kondiĉon: Nepras ke la blanka homo konsideru kiel fratojn la bestojn de tiu tero".

"Mi estas nenio alia ol sovaĝulo kaj mi ne komprenas. Mi vidis milojn da bizonoj morti sur la herboebenaĵo forlasitaj de la blanka homo kiu ilin faligis ekde rulanta trajno. Mi estas nenio alia ol sovaĝulo kaj mi ne komprenas kial viaj ŝtalaĵoj rajdatoj kiuj elkraĉas fumon estas pli valoraj ol la bizonoj kiujn ni nur mortigas por pluvivi".



*Hodiaŭ, ekologistoj  
aŭ morgaŭ: plantoj  
florojn sur niaj  
tomboj...*


"...La blankaj homoj neniam amis la teron, la arbojn, la bestojn. Kiam ni, la indianoj, mortigas por havi viandon, ni manĝas la tuton, ĉar ni respektas la beston de ni faligitan. Kiam ni eltiras radikojn, ni faras etaĵn truojn. Kiam ni bruligas la teron por mortigi la akridojn, ni detruas nenion. Ni nur utiligas mortitan lignon. Eĉ en la plej densa arbaro, ni neniam forhakas unu arbon. Sed la blanka homo plugas la teron, tordas kaj puŝbatas la arbojn, murdas ĉion. La arbo diras: "Ne faru tion. Tio doloras. Ne vundu min". Sed ili ĝin faligas hake kaj ĝin dispecigas. La Spirito de tiu ĉi tero abomenas ilin. Ili fortiras la arbojn ĝis la lasta radikoj. La indiano penas difekti nenion, sed la blankaj homoj detruas ĉion".

"... Kio estos pri la homo sen bestoj? Kiam ne plu estos bestoj, la homo mortos kun granda sento de soleco. Kio okazas al la bestoj tuj okazos al la homo mem. Ĉio interrilatiĝas, kio okazas al la tero alvenas al la filoj kiuj loĝas en tiu ĉi tero. Vi devos klarigi al viaj filoj ke la tero kiun ili piedpremas estas komponita de la cindroj de niaj antaŭuloj. Instruu ilin respekti tiun teron kaj diru al ili ke se la homo kraĉas sur la tero, li kraĉas sur li mem".

"Tion ni scias: Ĉio interkorespondiĝas, kiel la sango liganta familion. Ĉio apartenas al ĉio. La homo ne teksis la tolon de la vivo, li nur estas fadeneto de ĝi."

En sekvantaj alineoj vi povas legi artikolon senditan publikigcele de aktivulo de nia Societo. Ĝia enhavo estas timiga kaj ne nur koncernas la germanojn sed nin ĉiujn. Komenco estas eta, finon ni ne volus travivi...

Mondpaca  
Esperantista  
Movado Sekcio FRG



Kio  
estas  
"Berufsverbot" ?

adreso: MEM Sekcio FRG  
Schlossgasse 30 D-6731 ELMSTEIN 2

telefono: 06328/892  
poŝtĉekkonto: Lshfn11555-678

Ĉi tiu vorto ekzistas ekde la jaro 1972, kiam la estroj de la federaciaj landeroj de Federacia Respubliko Germanio (FRG) decidis: ke *malamikoj de la konstitucio* ne estu dungata en publika servo. Tiu decido estis la kulmo de maldemokratia evoluo en FRG kaj signifas, ke certaj personoj ne rajtas labori kiel instruisto, juĝisto, oficisto, eĉ leterportisto aŭ lokomotivestro. Por malkovri, kiu estas *malamiko de la konstitucio* la publika estraro kontrolas la vivon de ĉiu kandidato kaj dungito. La sekreta servo notas ĉiun arangon, manifestacion, demonstracion, kiun iu partoprenas, registras ĉiun subskribon, leteron al gazeto, flugfolion...

Iĝi *malamiko de la konstitucio* estas facile:

- Cu vi estas por paco kaj kontraŭ armado ?
- Cu vi estas kontraŭ atomcentraloj ?
- Cu vi ne fidus al la parlamentoj ?
- Cu vi kritikis la merkatekonomion ?
- Cu vi estas por la socialismo ?
- Cu vi vojaĝis al orienteŭropaj landoj ?

Bedaŭrinde en FRG vi estas suspektata malamiko de la konstitucio kaj bedaŭrinde la ŝtato, federacia landero aŭ urbo ne povas laborigi vin. Se vi hazarde estas komunisto, la membreco en komunistaj partioj sufiĉas.

Pacifistoj, socialdemokratoj, komunistoj estas malakceptataj kiel dungitoj aŭ oficistoj, ĉar la publika estrato havas la monopolon pri diversaj profesioj. Tiuj personoj nek povas labori, nek gajni monon per la profesio, kiun ili lernis aŭ studis. Tial oni nomas la fakton germanlingve: *Berufsverbot* = malpermeso de la profesio.

La *Berufsverbotoj* havas gravegajn sekvojn por la tuta socio. Studentoj, ekzemple, kiuj poste nur povas labori en la publika servo, tiuj publikas diri pri siaj opinioj, ili ne partoprenas protestojn kontraŭ malfacilaĵoj de la studado, ili eĉ ne voĉdonas por studenta parlamento. Partoprenante manifestacion, kiel la tradicia marŝo de la 1-a de Majo, la sekreta servo fotas ĉiun kaj metas en la komputilan kartotekon, kie estas kolektita ĉion ĝis ĝi estas prezentata je la malakcepto.

Ankaŭ en FRG estas homoj, kiuj lernis el la faŝisma tempo:

Diris la konata pastro Martin Niemöller:

*"Kiam la nacioj venigis la komunistojn, mi silentis; mi ja ne estis komunisto.*

*Kiam ili arestis la socialdemokratojn, mi silentis; mi ja ne estis socialdemokrato.*

*Kiam ili venigis la katolikojn, mi ne protestis; mi ja ne estis katoliko.*

*Kiam ili venigis min, neniu restis por protesti!"*

Miloj da personoj partoprenis manifestaciojn sub la devizo: "For la *Berufsverbotojn*". En ĉiu urbo ekzistas loka komitato, kie kunlaboras liberaluloj, socialdemokratoj, komunistoj kaj aliaj demokratiaj personoj. Ofte ili sukcesas akceptigi malakceptitan kandidaton per manifestacio de solidareco.

## La helpo per la solidareco

Eksterlandanoj ofte ne kredas, se germanoj rakontas pri *Berufsverbotoj*. Neniu alia Europa lando konas ĝin. La miro kaj protesto, kiu sekvas, igis la FRG-aŭtoritatojn pravigi sin antaŭ la enlanda kaj eksterlanda publiko. Ekzemple la pacnobelpremiita socialdemokrato Willy Brandt, kiu kunverkis la menciitan decidon, devis trankviligi la fratajn partiojn, sed li ne sukcesis. Komitatoj kontraŭ *Berufsverbotoj* ekzistas en multaj landoj (Francio, Italio, Nederlando, Usono) kaj ĝis laboro estas premo al la germanaj registaroj.

## Kial tio tuŝas pacmovadon?

Ni jam menciis, ke pacaktivuloj estas suspektataj malamiko de la konstitucio. Tio estas la unua argumento por kontraŭi. La dua estas: Kiam estas silentigita la demokrata movado, la propagandistoj de la "malvarma milito" agadas laŭte kaj publike. Per la ilo *Berufsverbotoj* ili timigas kaj subpremas ĉiun kontraŭulon. Tio estas danĝero por la nesekura paco en la mondo. Ĉar la NATO-strategio bazas sur la baldaŭa uzo de atomarmiloj, la venonta milito estos la lasta.

## Ĉu vi kunlaboras?

Kiel Esperantistoj ni povas utiligi la avantaĝojn de nia Internacia Lingo. Estis fondita komence 1977 "internacia laborrondo kontraŭ *Berufsverbotoj*", kiu laboras tiel:

*La germanlingvaj kunlaborantoj Esperantigas tekstojn, artikolojn ktp. kaj dissendas ĝin al la eksterlandaj kunlaborantoj, kiuj tradukas en la diversajn naciajn lingvojn kaj publikigas en nacia gazeto.*

# Homaj Rajtoj Teorio kaj Realeco

## temo.

La 16-an de decembro 1948 la Unuiĝintaj Nacioj decidis pri katalogo de bazaj rajtoj, kiujn ĉiu homo, sendepende de raso, religio aŭ nacieco. Granda, tamen facila decido en la juna porpaca organizaĵo - esperplena novkomenco post jaroj de tutmonda detruo.

Pasis longa tempo, la vivnivelo kreskis kaj la entuziasmo perdiĝis. La detruo estas forgesita, ankaŭ la vojo, kiu kondukis al ĝi. Ĉu hodiaŭ - tridek jarojn poste - homaj rajtoj estas nur ankoraŭ rimedo de politika disputo, ĉu la projekto fiaskis? Kian valoron la Deklaracio havas hodiaŭ?

## programo

La programskemo de la IS-oj havas tradicion. Ankaŭ ĉifoje ni havos prelegojn, laborgrupojn, kursojn, interkonatiĝon, balon, promenon, longajn noktojn, eble ankaŭ iam ion novan.

Ni kutimas ĉerpi la programkontribuantojn el la samaj fontoj kiel la partoprenantojn. Ni petas do tiun, kiu sentas sin alparolata de la temo - alivorte, havas informojn kaj opinion pri unu el ĝiaj aspektoj - disponigi sian scion por laborgrupo aŭ referaĵo (kontribuantoj ĝuas specialajn partoprenkondiĉojn). Kontaktu Elisabeth Schwarzer, Metele-ner Damm 3, D-4432 Gronau-Epe.

## elgrupo

La Internacia Seminario de GEJ estas arango, kiu unuavice direktas sin al lingve progresintaj junaj esperantistoj, kiujkapablas sekvi la diskutojn en la laborgrupoj kaj kompreni la prelegojn. Kompren-ble ni klopodos okazigi denove kurson por ekzerci la lingvajn kapab-lojn. Al komencantoj ni tamen rekomendas partopreni arangojn pli kon-venajn al iliaj interesoj.

# 22-a IS de GEJ

## aligilo

familia nomo: \_\_\_\_\_ antaŭnomo: \_\_\_\_\_

strato kaj numero: \_\_\_\_\_

urbo kun poŝtkodnumero: \_\_\_\_\_

lando: \_\_\_\_\_



# 27.12.78 - 3.1.79

## Dümmerlohausen

### loko


Dümmerlohausen estas vilaĝo, kies nomo iom indikas ĝian situon. Ĝi estas trovebla ĉe la nordokcidenta flanko de la lago Dümmer. Dümmerlohausen ne havas fervojan stacion. La plej granda relative proksima estas Diepholz ĉe nord-suda linio Osnabrück-Bremen. Automobilistoj povas atingi la lokon forlasante la aŭtoŝoseon Münster-Bremen ĉe indikoj Vörden/Neuenkirchen aŭ Holdorf en direkton Damme. La seminariejo estas nova junularhejmo kun 4-, 3- kaj 2-litaj ĉambroj, ses kunvenejoj kaj du laborejoj.

### aligo

Kotizoj kaj limdatoj estas sekvante indikitaj. La hejmo havas 108 litojn. Post la 108-a aligo ni devos peti kunporti blovmatracojn. Kiu do ne volas rezigni pri la komforto de propra lito, ne forgesu fruan aliĝon

aligo/aĝo	ĝis 20	21-25	26 kaj pli	eksterlandanoj kaj GEJ-membroj ĝis 25 jarojn aĝaj ricevos vojaĝsubvencion.
ĝis 30.09.1978	90,- GM	100,- GM	120,- GM	
ĝis 10.12.1978	100,- GM	110,- GM	130,- GM	
poste	110,- GM	120,- GM	140,- GM	

Sendu la aliĝilon al Guido Brandenburg, Brinker Damm 24, D-4404 Telgte. Via aliĝo estos konsiderata valida nur post ĝiro de 10,- GM antaŭpago al poŝtĉekkonto Karlsruhe, 545 77-754, je la nomo "Deutsche Esperanto-Jugend, Hindenburgufer 80/81, D-2300 Kiel 1".



naskiĝdato: \_\_\_\_\_ sekso: \_\_\_\_\_

partatempa ĉeesto (bv. nepre indiki): jes/ne

se jes, kiam? \_\_\_\_\_

vojaĝrimedo: trajno/automobilo

loko, dato: \_\_\_\_\_ subskribo: \_\_\_\_\_

# La laboristaj esperantistoj por pli batalema sinteno

Kvankam celanta ĉefe la pristudon de la problemoj pri disvastigo de esperanto en france parolantaj landoj, la 33-a kongreso de SAT-Amikaro (Laborista Esperanto-Asocio, 67, avenue Gambetta, F-75020 PARIS) kunigis en Rennes 132 partoprenantojn.

Postkarto kun prezento en bretona lingvo kaj esperanto estis eldonita tiuokaze; ĝi estas la frukto de kunigitaj klopodoj de la organiza kongres-komitato kaj de la kultura organizo "Brezhoneg Yezh Vew". Lernolibro por esperanto en la bretona estis eldonita de "Hor Yezh". La sukceso de tiu iniciato povus konduki poste al dulingvaj eldonaĵoj etna lingvo/esperanto, kaj favori pli bonan konon kaj pli grandan komprenon de la respektivaj ideoj.


La kongreso pristudis konkretajn decidojn por akceli la disvastigon - de la Internacia Lingvo ĉe la fizikaj kaj intelektaj laboristoj, kun aparta atento pri la laboristaj sindikatoj.

La strebo al informado, kiu montriĝis pozitiva dum la periodo 1977/78, estos forte pligrandigita; ankaŭ per la konstatoj rezultantaj el la - kuraĝigaj rezultatoj estos ellaboritaj novaj rimedoj por la memlernado de esperanto. La pli kaj pli grava kaj aktiva partopreno de gejunuloj cetera montris, ke la ideo pri internacia lingvo renkontas pli kaj pli favoran akcepton ĉe la junularo, kiam ĝi havas la eblecon sin dokumenti kaj studi tiun lingvon.

La debatoj de la kongreso rezultigis la unuanime akceptitajn ĉi sekvajn rezoluciojn:

1. La kongreso, emociigita de la katastrofo, kiu trafis la bretonan marbordon, asertas, ke tiu agreso kontraŭ la naturo, kiu trafas nun Bretonion, estas daŭra danĝero por la homaro.  
- firme kondamnas la respondeculojn, kiuj devis eviti tiun katastrofon;  
- esprimas profundan simpatian al ĉiuj, kiuj unuigas por provi limigi la multajn kaj terurajn konsekvencojn de tiu ĉi plago.
2. La kongreso alvokas la laboristajn esperantistojn al partopreno en la kampanjo kontraŭ fabrikado, vendo kaj ŝakrado de armiloj ĉiuspecaj, kampanjo lanĉita okaze de la venonta sesio de U.N. pri malarmado.
3. La kongreso subtenas la leĝproponon n<sup>o</sup> 1667, kiu celas enkondukon de la Internacia Lingvo Esperanto kiel fakultativa lingvo en la duagrada instruadon.  
- konstatas, sekve de multaj kontaktoj kun reprezentantoj de organizoj por la pluvivo de la bretonaj lingvo kaj kulturo, ke la uzo de la lingvo esperanto devas, en ĉiuj kazoj, kontribui al la disvolvo de la etnaj lingvoj kaj kulturoj.





LA TERO  
2198-a JARO

Fino...

... KWANKAN GI ROVUS ESTI  
LA KOMENCO...